# TEJO-aktuale: numero 98, 2003-02-06

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>;

1. LERNU.NET SUKCESAS!
2. AKTIVI EN TEJO KAJ EN UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
3. INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SVEDIO: MENDU KOLORAN AFIŜON
4. JUNULARA RENKONTIĜO EN UKRAINIO
5. ESPERANTA PORTALO "ĜANGALO"

---

## 1. LERNU.NET SUKCESAS!

40 tagojn post sia lanĉo, "Lernu!" <http://www.lernu.net>; atingis la nombron de 400 registritaj uzantoj el pli ol 40 landoj kaj pli ol 8 000 vizitojn! Ĉe "Lernu!" oni trovas plurajn retkursojn kaj multajn aliajn helpilojn por informiĝi pri Esperanto kaj lerni ĝin, en diversaj lingvoj. Nun, kiam iu verkas Esperanto-kurson por interreto, tiu ne devas fari la tutan laboron de la komenco, sed povas utiligi la ilojn de "Lernu!": traduk-sistemo, vortaroj, informoj pri Esperanto, ekzemplaj tekstoj kaj sondosieroj, tujmesaĝilo...

Kunlaboremuloj por aldoni novajn lingvojn aŭ iĝi lingvo-helpantoj tre bonvenas! Skribu al <teamo@lernu.net>.

---

## 2. AKTIVI EN TEJO KAJ EN UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

TEJO konsistas el junaj Esperanto-parolantoj kiuj aktivas pri diversaj taskoj. Se ankaŭ vi volas iun taskon kadre de la TEJO-agado, kaj deziras informojn pri la ekzistantaj taskoj, vi povas aliĝi al la listo "Aktivi en TEJO!" per malplena mesaĝo al <aktivi-en-tejo-subscribe@yahoogroups.com> aŭ vizitante la retpaĝojn <http://groups.yahoo.com/group/aktivi-en-tejo>; kaj <http://www.tejo.org/aktivuloj/listego.jsp>;.
La sama afero pri Universala Esperanto-Asocio (UEA) okazas per la listo <http://groups.yahoo.com/group/aktivi-en-uea>;.

---

## 3. INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SVEDIO: MENDU KOLORAN AFIŜON

La venonta Internacia Junulara Kongreso (IJK) <http://www.tejo.org/ijk>; okazos en Lesjofors (Svedio) de la 19a ĝis la 26a de Julio. Eblas peti kolore presitajn afiŝojn por reklami ĝin dum via renkontiĝo aŭ en via loka klubo: skribu al <nastja@ikso.net>. La aliĝilo kaj nigra-blanka versio de la afiŝo troviĝas ĉe <http://www.tejo.org/ijk/paliĝilo.php>;.

---

## 4. JUNULARA RENKONTIĜO EN UKRAINIO

Kijivo (Ukrainio), 30a de junio - 6a de julio: Renkontiĝo de Esperantista Junularo: kun kursoj, konkursoj, koncertoj, ekskursoj ktp. Informoj kaj aliĝoj: Mikaelo Lineckij <rejo@ukr.net>.

---

## 5. ESPERANTA PORTALO "ĜANGALO"

Malfermiĝis la tre moderna kaj riĉa esperanta portalo "Ĝangalo": vizitu ĝin ĉe <http://ĝangalo.com>;.

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikaĵoj/aktuale/koncepto.html>;.
La arĥivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>;.
Por aboni sendu mesaĝon al <majordomo@esperanto.org> kun la enhavo:
subscribe tejo-aktuale
Informojn kaj komentojn sendu al <tejo-aktuale-red@esperanto.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Oleg Izjumenko, Jevgenij Gaŭs, Giuseppe Castelli.
Tiun ĉi numeron redaktis Giuseppe Castelli.
Pri TEJO-aktuale ĉe Abonu.com ĉi-foje zorgis Sl. Ivanov.